

Claude Gacond intervjuas s-ron Olivier Tzaut pri la disko Tra l'mondo

SRI-1977-11-A-4-82

<http://www.esperanto-gacond.ch/SRI/Radiokasedo-1977-11/SRI-1977-11-A-4-82-Claude-Gacond-Intervjuo-kun-Olivier-Tzaut-pri-la-disko-Tra-l-mondo.mp3>

CG.- Parolas Claude Gacond. Hodiaŭ vi aŭdas intervjuon kun la svisa kanzonisto Olivier Tzaut. Sinjoro Olivier Tzaut, antaŭ kelkaj monatoj, tio estas en februaro, ni jam havis la honoron vin intervjui kaj tiam niaj geaŭdantoj povis aŭdi kelkajn el viaj kantoj. Kaj en unu el miaj demandoj mi tiam informiĝis, ĉu vi ne intencas fari diskon. Via respondo estis: jes, sed nun momente tio estas nura projekto. Sed montriĝas nun, ke la afero rapide evoluis ĉar la disko estas nun presata kaj estos verŝajne disponebla ĉirkaŭ la 10-a de julio. Kial vi decidis tuj fari la diskon ?

OT.- Mi volis tion pro diversaj kialoj. Unue, kiel sekretario de kampanjo, kiu celas enkonduki Esperanton en la lernejojn, mi konstatis la malriĉecon de niaj rimedoj sur la diskokampo. Kiam mi faras prelegojn, mi ŝatus prezenti Esperanto-diskojn je profesia nivelo. Sed ni havas preskaŭ nenion. Same, oni ne havas ion taŭgan por proponi al la radiostacioj. Due, mi volis proponi belajn, *ne verdajn* kanzonojn al la tutmonda esperantistaro. Mi jam diris foje, kion mi opinias pri la *verdaj kanzonoj* kaj pro tio mi ne rekomencas. Kaj, ĉar miaj kursanoj de baldaŭ du jaroj kantas kanzonojn kun granda plezuro, mi opiniis, ke tiuj ĉi plaĉos ankaŭ al la aliaj. Trie, kaj tio estas tre grava, ni esploras ĉiujn eblecojn por akiri financajn rimedojn. Mi jam diris ke ni kreis salajran fonduson por salajrigi la sekretarion de la kampanjo *Esperanto en la lernejojn*. Sed ni decidis prudente, ke ni ne tuŝos tiun fonduson tiom longe, kiam ne estos 12-monata salajro en la kaso. Nun, momente, estas 6'000 svisaj frankoj. La celo estas do ankoraŭ fora. Aliflanke, de januaro de tiu ĉi jaro mi laboras duontempe, sed sen salajro por Esperanto. Do mi ricevas nur ankoraŭ duonan salajron kiel instruisto. Kaj mi havas tri junajn infanojn. Ni esperis multe pli grandan kaj amasan helpon de la amikoj de Esperanto, sed ni estis iom seniluziitaj. Pro tio ni pensis, ke oni povus trovi monon eldonante diskon.

CG.- Vi disvendis jam certan kvanton da kanzonkasetoj aŭ sonbendoj. Ĉu la kanzonoj de la disko estos la samaj?

OT.- Jes, la kasedo entenis 16 kanzonojn kaj sur la disko troviĝas 12 el ili.

CG.- Bonvolu diri ion pri la kanzonoj mem.

OT.- Tiuj kanzonoj estas plejparte popolkanzonoj el diversaj partoj de la mondo. Ili estis kolektitaj kaj tradukitaj de mia amiko, Claude Piron el Coppet, apud Ĝenevo. Claude Piron estas ekstradukisto ĉe UN kaj Monda Organizo pri Sano. Kaj nun li estas psikologo kaj profesoro ĉe la Ĝeneva Universitato. Krome li verkas trafajn artikolojn pri Esperanto.

CG.- Ĉu ni aŭskultu parton de kanzono ?

OT.- Ho jes, volonte. Mi proponas la unuan strofon de la unua kanzono de la disko. Tiu estas meksika kaj titoliĝas 'Voĉe de gitaro mia'.

. . . . Kanto, muziko . . .

CG.- Estas belege. La akompanaĵo estas tre plaĉa kaj la muzikistoj multnombraj kaj lertaj. Ĉu ili estas profesiuloj?

OT.- Jes, en la tuta afero nur mi ne estis profesiulo. Unue mi devis trovi muzikaranĝiston kaj mi trovis lin ĉe la Radio Ĝeneva. Mi donis al li en marto de tiu ĉi jaro sonbendon de la kanzonoj kun la vortoj en Esperanto kaj tradukon en la franca. Kaj li verkis akompanaĵon por ĉiu kanzono. Samtempe li serĉis muzikistojn studion kaj tiel plu.

CG.- Olivier Tzaut, mi esperas sukcesan disvendon de via unua disko, kies titolon bone enkapigu niaj geaŭdantoj : ‘Tra l’ mondo’, ‘Tra l’ mondo’.

Vi aŭdis elsendon el Svislando. Claude Gacond intervjuis la kanzoniston Olivier Tzaut. Ĝis reaŭdo!

*Kopirajto © Claude GACOND, www.esperanto-gacond.ch
Prilaboris: [Stefano KELLER](#), novembro 2013*